Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

31-a Jarkolekto * Junio 2017 * N-ro 105

ISSN 1576-0618



OLVERA

kia strato, kia preĝejo kaj kia kastelo !

Gazeto Andaluzia
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@ono.com)

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio 3
La Mozaraba Jakoba Vojo 7
Lingva Angulo 11
Poezia Angulo 16
Turismi en *Olvera* 18
Paĝoj pri nia Historio 22
Flamenko 25
Andaluzia Kuirárto 28
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio 30
Vorta Piramido 32
Humuro 34

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



UNIVERSITATO DE SEVILO

★ Juan Diego Jiménez Bautista, arunda samideano, ĵus prezentis en la Universitato de Sevilo sian finan labor-eseon okaze de siaj magistraj studoj pri Antropologio: Mastrumado pri Kultura Diverseco, Heredaĵoj kaj Disvolviĝo. La temo de la eseo rilatis al la "Loka Disvolviĝo-Strategio en la eŭropa kadro 2014-2020: analizado de la rura areo LEADER Serranía de Ronda".


Apud la devigaj resumoj de la eseo en la hispana kaj en la angla lingvoj, li aldonis resumon en esperanto kiu aperas sekve al la du aliaj lingvoj en la komenco de la eseo. La tribunalo kvalifikis la laboron kiel "elstaran" kaj oni menciis la aperigon de la esperanta resumo kiel aferon rimarkindan en tiu eseo.



ASEMBLEO DE SEVILA ESPERANTO-ASOCIO

★ La pasintan 23an de junio 2017 okazis la asembleo de Sevila Esperanto-Asocio. La renkontiĝo finiĝis en restoracio kie oni disdonis la diplomojn pri lernado al tiuj gelernantoj kiuj sekvis la kurson organizata de la asocio en la "Domo de la Sirenoj". La etoso estis tre agrabla kaj oni debatis pri venontaj agadoj por la disvastigo de esperanto en Sevilo.







NOVA ANDALUZIA LERNANTO SEKVAS ESPERANTO-KURSON EN LA UNIVERSITATO EN POZNAN (POLLANDO)

★ La pasintan monaton septembron startis nova grupo por sekvi Esperanto kaj Interlingvistikajn Studojn en la Universitato "Adam Mickiewicz" en Poznan (Pollando). Temas pri 20 partoprenantoj el 12 landoj, inter ili Vicente Manzano Arrondo, de El Puerto de Santa María (Kadizo), stipendiita de nia asocio por sekvi tiujn universitatajn kursojn.


Li estas la dua lernanto kiu ricevas helpon de la andaluzia asocio. Ĉi-jare finiĝas en tiu Universitato Fátima Jiménez García, kiu dum 3 jaroj sekvis tiujn samajn studojn kaj espereble dum la venonta monato februaro ŝi presentos sian fin-karieran eseon.




JURA REVUO

★ Kiel ĉiuj jaroj Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kunlaboras en la eldonado de la revuo *"Jura Tribuno Internacia"*, oficiala organo de Internacia J urista Esperanto-Asocio (jen la nova nomo de la eksa

Esperanta Jura Asocio). La revuon oni prezentis okaze de la asembleo de la jura asocio kadre de la Universala Kongreso de Esperanto, okazonta fine de la monato julio 2017 en Seulo (Koreio).



VIZITOJ DE ESPERANTISTOJ EN ANDALUZION




Norvega samideano **Claude ROUGET kaj sia filino** vizitis la urbojn Malago kaj Kordovo dum la pasinta monato julio 2017.

Ili loĝas en la norvega urbo Tromsø, proksime al la Norda Poluso, do, sendube temas pri la plej nordaj esperantistoj en la mondo. Claude estas franco denaske kaj kune kun sia edzino, rusino, formis en Norvegio esperantistan familion.

Claude Rouget kaj sia filino kune kun samideano en Kordovo.

La Mozaraba Jakoba Vojo

Inter la preskaŭ tricento da pilgrimaj vojoj kiuj finiĝas ĉe Santjago de Kompostelo, tiuj kiuj komenciĝas en Andaluzio ricevas la nomon "*Mozaraban Vojon*". Verdire, ne temas pri ununura vojo, ĉar ene de ĝi estas eble trovi malsimilajn vojojn komenciĝantaj en malsamaj urboj, tamen ĉiuj ili enkadriĝas sur tiu ĝenerala nomo Mozaraba Vojo.



La komenco de la kulto en la Ibera Duoninsulo al la Apostolo Jakvo, unu el la sekvantoj de Jesuo, datiĝas en la jaro 812, kiam, supozeble, oni trovis liajn restaĵojn en Galegio. Kvankam ne ekzistas historiaj pruvoj, la tradicio asertas, ke la Apostolo Jakvo kristanigis la enloĝantojn de tiu regiono, nord-okcidente de la Ibera Duoninsulo. Malgraŭ tio, la bibliaj tekstoj asertas, ke la Apostolo mortis en Jerusalemo.

La astura reĝo Alfonso la 2-a, la ĉastulo, ordonis la konstruon de preĝejo sur la tombejo kie supozeble aperis la restaĵoj de la Apostolo, jen la origino de la nuntempa impona katedralo de Santjago de Kompostelo. La pilgrimadoj por preĝi antaŭ la tombejo komenciĝis tuje kaj post unu jarcento pilgrimantoj de la tuta Eŭropo jam alvenis en

Galegion por viziti la tombon de la Apostolo. Naskiĝis tiam la Jakoba Vojo.



Katedralo de Santiago-de-Kompostelo ĉe la Placo Obradoiro

Dum tiu epoko, la sudo de la Ibera Duoninsulo estis la islama Al-Andaluso, regno kiu de tempo al tempo luktis kontraŭ la nordaj kristanaj reĝoj. Malgraŭ la islameco de Al-Andaluso, ankaŭ ĉi tie loĝis kristanoj, nomitaj *Mozaraboj*, kiuj sukcesis pilgrimadi en Santiagon nur dum pacaj epokoj aŭ kiam la povo de la islamanoj malfortiĝis. Aperis do, la mozaraba jakoba vojo.



Ĉi tiu vojo trapasis praajn romiajn vojojn, ĉefe la tiel nomata *"Arĝenta Vojo"*, kiu malgraŭ tiu nomo neniel rilatas al arĝento. La nomo de ĉi tiu vojo devenas el la latin-lingva *"Via Delapidata"* (vojo kun ŝtona pavimero); la latina vorto *"delapidata"* havas iel similan sonon al la posta hispana *"de plata"*, do tiun nomon ricevis la vojo inter la betika romia provinco en la sudo de la Ibera Duoninsulo kaj la nordaj regionoj, tuj apud la Kantabrika Maro.

Ĉiuj mozarabaj jakobaj vojoj sekvas tiun *arĝentan* vojon tuj post atingi la ekstremaduran urbon Merido, tamen ne ĉiuj mozarabaj vojoj havas ununuran komencon. Tiel, estas eble eliri el Malago, Almerio, Granado, Jaeno aŭ Kordovo.

La almeria vojo unuiĝas kun tiu de Granado en ĉi tiu urbo kaj post trapasi Jaenon, ĉiuj ili, ankaŭ la vojo kiu komenciĝas en Malago, pasas tra Kordovo kaj la belega kordova montaro en la norda parto de la provinco. Trapasi la pinton *Calatraveño*, norde de la provinco Kordovo estas belega natura aventuro.



Cipo apud kordova vilaĝo montras la vojon en Santiago-de Kompostelon laŭ la Mozaraba Vojo


Alia interesa afero esas la fakto, ke ne nur la vojoj kiuj trapasas la Pireneojn kaj la nordajn regionojn de Hispanio posedas Jakobajn instalaĵojn. Tiel, en Andaluzio ankaŭ ekzistas asocioj prizorgantaj pilgrimantojn, taŭgaj cipoj tra la vojoj aŭ rajtigo por stampi jakobajn paŝportojn, norde de la kordova provinco eĉ estas eble trovi modestajn gastejojn por la pilgrimantoj kaj abundajn montrilojn en la

nuntempaj vojoj, celantaj helpi la pilgrimantojn sekvi la taŭgan vojon en Santiago-de-Kompostelon.

Sendepende de religiaj konsideroj, kiuj povas esti sekvataj aŭ ne de la pilgrimantoj mem, la mozaraba vojo en Santjagon estas unu el la plej realigindaj aventuroj en Andaluzio, kompreneblene plenumota ne dum somero, pro la varmego, sed ĉefe dum printempo aŭ en aŭtuno.




Amu vian landon: konu ĝian historion !



Lingva Angulo

Uzo de la prepozicio POR



clipartof.com/1233388

Ofte ni, hispan-lingvanoj, konfuzas pri la uzo de la prepozicio POR, tiel ni tradukas aŭ uzas ĝin laŭ nia hispanlingva sam-sona *"por"*. Ambaŭ prepozicioj, ĉu en esperanto, ĉu en la hispana lingvo, estas tute malsimilaj.

La esperanto POR montras intencatan celon, ni povas traduki tiun POR per la hispanlingva *PARA*, kvankam ĝi havas plurajn kromajn uzojn.

Kiel dirite, POR montras celon, tamen ankaŭ alia prepozicio havas tiun sencon, temas pri AL. Ni vidu la diferencojn. AL normale parolas pri celo atingota tutcerte; POR ne nepre signifas, ke tiu intenco efektiviĝas.

Jen kelkaj ekzemploj helpantaj distingi AL kaj POR.

- Mi iras en la kamparon por ripozi.
  (Yo voy al campo para descansar)
- Ĉi tiu vojo kondukas al nia somer-domo.
  (Este camino conduce a nuestra casa de verano).

Ni vidu, ke "Vojo al" sendube direktiĝas en iun lokon; tamen se ni uzas "Por", ĝi temas nur pri deziro, projekto, intenco… tamen, ne necese ĝi plenumiĝos. Tiel, se *se mi iras en la kamparon por ripozi*, jen celo atingota aŭ ne. Sed, se *mi sekvas vojon al Malago*, mi atingos tutcerte tiun urbon.

Alia uzo de la prepozicio POR montras la uzanton, ricevanton aŭ profitanto de iu ago. Ekzemple:

- Mi aĉetis ĉi tiun kajeron por mia filo.
  (Yo compré este cuaderno para mi hijo)

Tio estas, la celo de la aĉeto de la kajero estis, ke la filo ricevu ĝin, alia afero estas la fakto, ke la filo ricevis ĝis aŭ ne. Ni vidu denove la diferencon kun la prepozicio AL. Tiel, se mi diras: *"Mi aĉetis ĉi tiun kajeron al mia filo"*, tio signifus, ke efektive la kajeron ricevis la filo, ne temis nur pri deziro sed pri efektiva transdono de la kajero. En ĉi tiu senco la prepozicio POR tute egalas en la uzo al la hispana *PARA*.

Pliaj ekzemploj:

- Mi supreniros la plej altan monton por vi.
  (Subiré a la montaña más alta para ti –también podría traducirse en español como "por ti").

- Ĉi tiu natura parko povas esti taŭga loko por niaj ferioj.
  (Este parque natural puede ser un lugar adecuado para nuestras vacaciones).

- La kuiristo preparis bongustajn manĝaĵojn por la klientoj.
  (El cocinero preparó unos platos deliciosos para los clientes).

POR ankaŭ povas montri pozitivan opinion pri io, jen kelkaj ekzemploj:

- Esperanto estas taŭga lingvo por la internacia komunikado.
  (Esperanto es una lengua apta para la comunicación internacional).

- La plejmulto el la partoprenantoj voĉdonis por la unua punkto de la tagordo.
  (La mayoría de los participantes votaron a favor del primer punto del orden del día).

Do, se paroli pri voĉdonado, la prepozicio POR ankaŭ povas esti komprenata kiel "*favore al*". Tiel, ni vidu la jenan rezulton de voĉdonado:

- 48% poraj voĉoj.
- 40 % kontraŭaj voĉoj.
- 12% sindetenoj.

Tio estas, 46 procento el la voĉoj estis favoraj al la propono.

Por

La prepozicio POR ankaŭ povas esti uzata kun la celo indiki la monon pagitan aŭ ricevitan pro iu servo. Tiel:

- Mi vendis mian domon por cent mil eŭroj.
  (Yo vendí mi casa por cien mil euros).
- Li aĉetis antikvan libron por malmulte da mono.
  (El compró un libro antiguo por poco dinero)
  Ĉi-kaze ankaŭ oni povas uzi "kontraŭ malmulte…"

Rilate tempon, POR povas montri tempon kiu daŭras ago aŭ la rezulto de tiu ago. Ekzemple:

Mi vojaĝos en Kadizon por unu semajno.
La fabriko ĉesos produkti tiujn varojn por ĉiam.

Atentu, ne konfuzu tempan POR kaj dum. *Dum* simple montras tempo-daŭron kaj POR montras celatan tempo-daŭron. Pli klara ekzemplo de ĉi tio povas esti jenaj preskaŭ similaj frazoj:

Mi petas vin iri tien dum unu minuto.
Tio estas, mia peto daŭros nur unu minuto.

Mi petas vin iri por unu minuto.
Tio estas, vi devas esti tie nur dum unu minuto.

POR antaŭ *KE:*

Sur aliaj numeroj de nia revuo, ni jam parolis pri la konstruo "POR KE". Unue, oni devas averti, ke ni ne devas konfuzi *POR KE* kun la hispanlingva samsona *PORQUE.* Memoru, ke la hispalingva "porque" en esperanto estas ĈAR. "Por ke" en esperanto ni devas traduki kiel "*para que",* kaj ĝi montras frazon kiu estas la celo de la ĉefa frazo.

Tiel:

Lavu viajn manojn, por ke vi evitu infekton.
(Lávate las manos, para que evites una infección)

Memoru, ke preskaŭ ĉiam oni uzas U-verbon post KE. Jen pliaj ekzemploj:

Studu multe nun por ke vi povu atingi pli bonajn rezultojn en la lernejo.
(Estudia mucho ahora para que puedas conseguir mejores resultados en la escuela).

Eliru unu horo pli frue por ke vi evitu obstrukciĝoj sur la aŭto-vojo.
(Sal unua hora antes para que evites retenciones en la autopista).

ALIĜU AL
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: esperanto14@ono.com
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- Banco BMN (eksa Caja General de Ahorros de Granada)
  ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2018

aeu

Andaluzia Esperanto - Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto

75-a datreveno de la morto de la poeto MIGUEL HERNÁNDEZ 1910 ~ 1942

ETERNA OMBRO

Iam mi kredis: la lum' estas mia,
sed mi en ombron profundan ĵetitas.
Braĝo suneca, kontento radia
lume, bolŝaŭme, dezire krepitas.

Sango leĝera kaj ronda tumultas:
arda, pur-blanka, senlima sopiro.
Lumo la lumon ekstere sepultas.
Al mi nur ombron provizas la brilo.

Nure nur ombron. Sen sun' kaj ĉielo.
Spacoj. Estaĵoj. Kaj korpoj tuŝeblaj
en la nefluga kaj stagna aero
kaj en la arbo de revoj neeblaj.

Nigraj pasioj, mienoj teruraj.
Ruĝe sin kovri la dentoj jubilas.
La absolutaj rankoroj obskuraj.
Al blindaj putoj la korpoj similas.

Mankas la spaco. Forsinkis la rido.
Jam ne plu eblas al alto sin ĵeti.
Volas la koro kun pli da rápido
l' ombrojn grandigi, en ilin impeti.

Karno senorda iranta lavange
al la tenebro sterila, horora.
Ĉu trainvados la sun´ lumo-lange?
Sed ne aperas eĉ spuro aŭrora.

Nure la lumo de pugnoj ekscesaj
Kaj de embuskaj dentar-horizontoj.
Ĉie la dentoj kaj pugnoj agresaj.
Pli ol la manoj fermiĝas la montoj.

Lukto sen morgaŭ nur estas mizero.
Diste, opaka batado de koroj !
Mi estas unufenestra karcero
fronte al granda soleco de roroj.

Mi aŭdas tra mi, aperta fenestro,
Iri la vivon sinistran kaj sombran.
Sed en la lukto ekzistas sun-resto
Ĉiam venkanta la denson plen-ombran.

Esperantigis: Fernado de Diego



Turismi en ... OLVERA (Kadizo)

La tradicia dirâjo asertas, ke *"Olveras estas nur unu strato, unu kastelo kaj unu preĝejo, tamen kia strato, kia kastelo kaj kia preĝejo!"*. Verŝajne, la tradicia popolo tute pravas, ĉar Olvera estas unu el la plej belaj vilaĝoj en Andaluzio kaj ĝia kastelo estas konsiderata kiel unu el la plej imponaj en Hispanio.

Olvera situas sur la nord-okcidenta flanko de la Kadiza Siero, tre proksima ankaŭ al la malaga kaj sevila provincoj kaj ĝi estas la pordo de la "Vojo de la Blankaj Vilaĝoj", vojo tra kiu estas eble koni aliajn belegajn lokojn kiel *Arcos de la Frontera, Grazalema, Espera, Puerto Serrano, Ubrique* kaj aliajn vizitindajn kaj vivindajn vilaĝojn.

Pri la fondiĝo de la urbo ne ekzistas tute akceptita opinio. Kelkaj historiistoj diras, ke tuj apud la nuntempa Olvera troviĝis kelta siejo nomita *"Caricus"*. Aliaj studoj asertas, ke Olvera estas la romia urbo *Ilippa* aŭ *Illipula Minor,* kaj eĉ, ke temas pri la urbo *Hippa* pri kiu skribis la romia Plino en "Historio". Tutcerte sur tiu zono sieĝis la romianoj, kaj tion pruvas nombraj romiaj restaĵoj trovitaj tie, kiuj pravigas la ekziston de romia urbo jam fine de la 3-a jarcento p.K.



Blazono de OLVERA

Komence de la 8-a jarcento la islamanoj venas en la Iberan Duoninsulon. La nord-afrikaj berberoj sidejis sur la Kadiza Siero, plejeble la nuntempa Olvera estis la grava vilaĝo *Calcena*, pri kiu parolas la historiisto Al-Himyari kiel la ĉefurbo de la provinco Saduna. Pro la fakto, ke Olvera situis ĝuste ĉe la landlimo inter la kristana Kastila regno-lando kaj la islama Granada regno, okazis tie oftaj

luktoj, tiel, en la jaro 1327 la kastila reĝo mem Alfonso la 11-a eliras el la ubo Sevilo por konkeri Olveran kaj okupi poste la tutan ĝibraltaran regionon, kiu estis gravega por la islama Granada regno. Post intensa lukto, kaj pro la efiko de la plej modernaj kastiliaj milit-maŝinoj, la islama urbestro de la urbo *Ibrahim ibn Utman* submetiĝis je la kastilia reĝo, tamen li atingis la promeson respektigi, fare de la novaj konkerantoj, la domojn kaj kulturon de la islamanoj tie loĝantaj.

Tamen, post la kristana konkero de la urbo preskaŭ ĉiuj praaj islamaj enloĝantoj foriris el la urbo kaj pro tio la kastilia reĝo devis proklami municipan leĝaron speciale por Olvera, laŭ kiu tiuj krimuloj kaj rabistoj estus pardonitaj post unujara restado en la urbo. Tiam naskiĝis la sentenco *"Murdigu iun kaj poste iru en Olveron"*. Ĉi tiu speciala leĝo poste estus aplikebla por novaj konkeritaj vilaĝoj. En tiu tempo aperis la nova nomo de la urbo, proklamita de la unua kristana vilaĝestro kiu uzis la nomon "*Olivera"*, pro la abundo de oliv-arboj en la zono. Poste la nomo devenus en *Olvera.* Post la konkero de la apuda urbo Arundo, la strategia graveco de Olvero malaperis.

Komence de la 19-a jarcento la napoleonaj trupoj eniris en Hispanion kaj atingis post iom da tempo la sudan parton de la Iberan Duoninsulon. En la jaro 1810 la francaj trupoj detruis la municipan arĥivon, la muregon kaj eĉ la kastelon. La olveraj enloĝanoj sin defendis pere de la agado de gerilistoj en la Arunda montaro.

En la komenco de la 20-a jarcento oni konstruis aŭtomobil-vojon kiu ebligis pli komfortan komunikadon de Olvero kun Sevilo kaj Kadizo. Nuntempe Olvero estas vilaĝo kun 9.000 enloĝantoj kiu bazigas sian ekonomion sur la terkulturo, ĉefe la oliv-arboj.

Monumentoj

- Preĝejo de la Virgulino de *La Encarnación*


Temas pri la plej bela kaj videbla preĝejo en Olvero. Post la detruo en la jaro 1822 de la ĉefa prĝejo, la Dukoj de Osuno helpis la

starigon de ĉi nova preĝejo, kies konstruado finiĝis en la jaro 1843. Oni konstruis ĝin laŭ la nov-klasika arkitektura stilo. Ambaŭ turoj estas videblaj ekde la tuta vilaĝo.



- Araba kastelo

Starigita fine de la 12-a jarcento, ĝi utilis kiel defend-loko de la islama Granada regnolando. Ĝi stariĝas sur la plej alta pinto de la urbo. Post la kristana konkero oni rekonstruis la kastelon laŭ la kastilia stilo. Ĝi estas konsiderata kiel unu el la plej belaj kasteloj en Hispanio.



- Antikva kvartalo

Ĝi troviĝas sur la plej alta zono de la vilaĝo. Promenadi tra ĝiaj stratoj similas vojaĝi tra araba vilaĝo de antaŭ 700 jaroj. La stratoj estas mallarĝaj, kun belegaj anguloj kaj malmultaj rektaj linioj. Ĉi tiun

kvartalon ĉirkaŭigis araba murego, kies restaĵoj, kvankam ne tro multaj, ankoraŭ ekzistas.

La antikva islama moskeo stariĝis sur la sama loko kie hodiaŭ troviĝas la kristana paroĥejo. Videblas ankaŭ la "Turo de la Pano", antikva araba konstruaĵo kie situis panejo.

Festoj

Krom la kutimaj karnavalaj festoj, tre popularaj tra la tuta kadiza provinco, kaj la Pasko, oni devas elstari la *Lunes de Quasimodo* (Lundoj de Kvasimodo). Ĉi tiu pilgrimado okazas la dua lundo post Pasko, ĝi okazas ekde la jaro 1715, kiam oni decidis festi la finon de kelkjara ne-pluveco.

Gastronomio

La ĉefa ingrediento ĉe la Olvera gastronomio estas la oliv-oleo. Krom tio, la plej populara manĝajo estas la supo "pegá". Oni uzas por ĉi tiu recepto asparagojn, panon, ajlon kaj oliv-oleon. La ter-pomoj *zapateras* kaj la kolbaso ankaŭ estas tre bongustaj. Dum la festo de la *Lunes de Quasimodo,* oni preparas tipan dolĉaĵon.

Venont-numere TURISMI EN ....

TEBA (Malago)

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Vicente Ballester Tinoco, esperantismo kaj anarkismo en Kadizo

Vicente Ballester Tinoco naskiĝis en la urbo Kadizo en la jaro 1903. Li estis la plej aĝa filo ĉe laborista familio. Post elementaj studoj li eklaboris apud sia patro kiel vernisisto kaj poste kiel lignaĵisto.

En la jaro 1920 li aliĝis al la anarkisma movado kaj nur du jarojn poste li apartenis al la grupo "Fermín Salvochea", nomo de unu el la plej gravaj kadizaj anarkistoj dum la 19-a jarcento. En tiu sama jaro li jam estis konstanta propagandisto de la anarkisma movado en sia urbo, tial li ĉeestis ssekretan renkontiĝon de la andaluziaj anarkistoj en Sevilo.



Vicente Ballester Tinoco
1903 - 1936

En 1923, nur dudek-jaraĝa, li estis la vic-prezidanto de la Laborista Ateneo kaj li estis ofta partoprenanto en la redaktado de la revuo *Alba Roja* (Ruĝa Sun-leviĝo). En tiu sama jaro, Miguel Primo de Rivera, armeestro en Katalunio, ribelas kontraŭ la hispanaj tiutempaj politikistoj, la reĝo Alfonso la 13-a aprobas la puĉon kaj proponas al tiu generalo kiel nova guverniestro en Hispanio. La unuaj leĝoj celis la malpermeson de la politikaj partioj kaj sindikatoj. Do, la agado de Vicente Ballester, almenaŭ tiu publika agado, devis ĉesi. Li profitis tiujn jarojn por pliigi sian kulturon, li aliĝis al framasonismo, kvankam post kelkaj jaroj li forlasis tiun movadon, kaj legis multnombrajn

librojn, ĉefe tiuj de la plej popularaj anarkisma aŭtoroj. Supozeble dum tiuj jaroj, li ankaŭ lernis la internacian lingvon, ĉar inter la jaroj 1928 kaj 1930 li instruis Esperanton en la *Sociedad Esperantista Gaditana* (Kadiza Esperantista Societo).



Fondiĝo de la Sociedad Esperantista Gaditana
17-a/Januaro/1929
Vicente Ballester stariĝas la dua maldekstre

Kiam malaperis la diktaduro de la generalo Primo de Rivera en Hispanio, Vicente Ballester reprezentis la kadizan anarkismon okaze de sindikalisma renkontiĝo en la jaro 1930 kaj nur unu jaro poste, li eniris en la malliberejon, unuafoje, pro sia aparteno al strik-komitato. Dum la sekvantaj jaroj, jam starigita la respubliko en Hisapnio, li ĉeestis multnombrajn sindikalismajn renkontiĝojn, tamen li denove eniris en la malliberejon, ĉefe post la ribelo de la asturaj ministoj en oktobro de la jaro 1934. Li estis ofta preleganto en sindikalismaj kongresoj okazitaj en Madrido, Barcelono, Zaragozo, Sevilo, ktp. Ene de la anarkisma movado li apartenis al sekcio kiu simpatiis al la liberacana komunismo.

Kiam la generalo Franco ribelis en la nordo de Afriko kontraŭ la respublikaj aŭtoritatuloj kaj la naciismaj trupoj eniris en la duoninsulon, Vicente Ballester kaŝiĝis ĉe kelkaj amikoj. Tamen, la 19-a de septembro iu informis al la militistoj en Kadizo, ke li troviĝis ĉe ŝuisto en la strato Celestino Mutis en la urbo. Falangistoj arestis lin kaj post rapida kaj sen-garantia proceso li mortis mort-pafita tiu sama tago, la 19-a de septembro 1936, en fosaĵo ĉirkaŭ la *Puerta de Tierra*, ĉe la kadiza murego. Lia kunulo, la ŝuisto kiu gardis lin, suferis la saman vivo-finon..

En la jaro 1997 oni publikigs libron kun liaj tutaj politikaj artikoloj sub la titolo: *"Se nace hombre libre"* (Oni naskiĝas kiel libera homo).



Sindikalisma diskurso en Kadizo de Vicente Ballester.
Majo 1936

FLAMENKO

Don Antonio Chacón



Ni vidis ĉi tiun bildon okaze de antikvaj filmoj: ĵus naskita bebo aperas ĉe la pordo de la hejmo de humila familio. Malgraŭ la malfacilaj ekonomiaj cirkonstancoj, la familio decidas ackepti kaj prizorgi la infanon. Nu, ĉi tio mem okazis la 16-a de majo de la jaro 1869 en Jerezo, ĝuste antaŭ la pordo de la domo de la ŝuisto Antonio Chacón Rodríguez kaj lia edzino María García Sánchez, ĉe la strato Sol. La novaj "gepatroj" akceptis lin kaj decidis nomi lin kiel la akceptanta patro: Antonio Chacón.

La urbo Jerezo estas la lulilo de la flamenka arto, do, la infano aŭdis konstante flamenkajn kantaĵojn kaj jam apenaŭ 12-jaraĝa kantis okaze de bapto-festoj en sia urbo. Tiuj unuaj "sukcesoj" igis lin ludi ĉe malgranda teatro, kvankam tiam li ne tro multe sukcesis. Malgraŭ tio li decidis ludi profesie kiel flamenka kantisto kaj tiel, kune kun la fratoj Molina (gitar-ludisto kaj dancisto), li partoprenis en flamenka turneo tra la provincoj Kadizo, Sevilo, Badahozo kaj Onubo.

En la jaro 1886, apenaŭ 17-jaraĝa, li kantis antaŭ la granda Enrique el Mellizo, pri kiu ni parolis pasint-numere. La tiama majstro diris pri Antonio Chacón: *"iufoje li estos konata kiel la Papo de la Flamenka Kantado"*. Ekde tiu tago kaj dum multaj jaroj ene de la flamenka mondo, la kantado estus konkuro inter Enrique el Mellizo kaj

Antonio Chacón. Tiu tago naskiĝis nova kantisto kiu ludis en la plej prestiĝaj teatroj tra la tuta Andaluzio.

Dum tiuj jaroj la plej sukcesa organizanto de flamenkaj spektakloj estis Silverio Franconetti, iama kantisto. Li dungis Antonio Chacón kaj dum 8 monatoj, tagon post tago, li ludis ĉe Silverio. Kiam li finis la propra Silverio devis denove ekkanti por certigi iamaniere la ĉeeston de la klientoj, kiuj tute ne ŝatis la foriron de Antonio Chacón.



Don Antonio Chacón kaj la gitar-ludisto Ramón Montoya

En la jaro 1889 li ekturneis tra la tuta Hispanio jam konsiderata kiel unu el la plej grandaj flamenkaj kantistoj. Li estis eleganta, eĉ majesta, pro tio li estis nomata ĉiam "Don Antonio", sendube li estis la unua flamenka kantisto kiu estis nomata "sinjoro", ni memoru, ke ĉiuj ili naskiĝis en humilegaj familioj kaj kantis antaŭ mon-hava aŭ eĉ nobela publiko.

En Madrido li ludis ĝis la jaro 1914, dum tiuj jaroj nobeloj kaj burĝuloj ĉeestis la teatrojn por aŭskulti la jerezan majstron aŭ eĉ invitis lin al siaj hejmoj por organizi privatajn flamenkajn spektaklojn, la tiel nomataj "*juergas flamencas*". En 1914 li decidis vojaĝi en Amerikon


kie li turneis tra kelkaj urboj, inter ili Bonaero kaj Montevideo. En la jaro 1922, jam konsiderata kiel la plej granda vivanta flamenka kantisto, li prezidis la konkurson pri flamenka kantado en Granado, organizata de Manuel de Falla kaj Federico García Lorca.

Don Antonio Chacón mortis en Madrido en la jaro 1929. Enhavantaj la kantadon de la majstro ankoraŭ restas kvindeko da gramofon-diskoj. Kvankam apud li ĉiam troviĝis prestiĝaj gitar-ludistoj: inter ili Sabicas aŭ la majstro Montoya, li estos ĉiam konata pro sia kantado sen muzik-instrumentoj: *seguiriyas, serranas, soleares, peteneras* kaj *tientos.* Same, pri li oni diras la esploristoj, ke li estas la patro de la flamenkaj stiloj *malagueñas* kaj *granaínas.*

Aŭskulteblas originalaj kantaĵoj de la majstro Antonio Chacón ĉe:
https://www.youtube.com/watch?v=_6OrgMpGBhg

(aŭskultebla ĉe
http://tomaflamenco.com/es/tracks/3926)

La sonoriloj de l´ preĝejo
se oni demandas por kiu sonas
la sonoriloj de l´ preĝejo
vi respondu, ke ili sonas
pro miaj mortintaj esperoj




ANDALUZIA KUIRARTO

La Arranque

Pli ol manĝaĵo, gazpaĉo estas familio de tipaj andaluziaj manĝaĵoj, bazitaj ĉefe sur la oliv-oleo, la tomato kaj la malmola pano. Al ĉi tiu elstara kaj nobela familio de manĝaĵoj apartenas ankaŭ en Andaluzio la kordova salmoreho, la *porra* de Antekero, la *gazpachuelo* kaj se oni forgesas la uzon de tomatoj, eĉ la *ajoblanco.*

Hodiaŭ ni sciigas pri alia varianto de la tipa gazpaĉo, la *arranque,* pli simila al tiu kordova salmoreho. Oni preparas ĝin en la kadiza provinco kaj pli specife estas tipa somera manĝado en la urbo Rota.

Unue, estas necese averti, ke oni ne devas uzi elektronikan dispecigilon. Jes, ĉi tiuj elektronikajn kuirilojn alportis grandan avantaĝon cele la preparadon de multajn manĝaĵojn, ankaŭ al gazpaĉoj, ĉar oni evitas longan kaj pezan preparadon rilate la dispistadon de la produktoj. Tamen, en la kazo de la preparado de la *arranque*, la dispistado de la produktoj ne devas esti tre intensa, tiel en la fina rezulto devas aperi videblaj pecetoj.



Jen la ingredientoj:

- 4 tomatoj tute ruĝaj, do sufiĉe maturaj.
- 4 italaj verdaj paprikoj.
- 2 ajleroj.
- ½ kilogramo da malmola pano, do tiu de la hieraŭa tago.
- Oliv-oleo, unu malgranda glaso.
- Salo

Jen la preparado:

1.- Ene de pistujo oni verŝas la paprikojn, salon kaj ajlerojn. Dispistu ilin, la rezultaĵo devas aspekti pasto.

2.- Aldonu la panon, dispecigita per-mane laŭ malgrandaj pecoj. Atentu, uzu nur la paneron, ne la kruston.

3.- Aldonu la tomatojn kaj la oliv-oleon. Daŭrigu la pistadon ĝis la atingo de pasto kie neniu ingrediento estas klare videbla.

Bonan Apetiton !

Ĉi-recepta vortaro:



Verda itala papriko



Ajleroj




Tomatoj




Oliv-oleo



Salo







Pistujo

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La kampara domo de "los Asombros" en Priego de Córdoba



Inter la provincoj Granado, Kordovo kaj Jaeno ekzistas zono konita kiel la "Magia Cirklo" de Andaluzio. Ĉi tiu loko estas pli-malpli triangulo inter la vilaĝoj Iznajar en Kordovo kaj Valdepeñas kaj Alcaudete en Jaeno. Antaŭ kelkaj jaroj eĉ universitata profesoro redaktis tezon por studi la altan nombron da memmortigoj en tiu zono, la plejmulto el ili post pendumo sur arbo.

Ene de tiu *magia cirklo* troviĝas lokoj kie la nombro da pendumigitoj estas eĉ pli alta, unu el tiuj lokoj estas la kampara domo de *"Los asombros"* (la timoj). Oni diras, ke la unuaj kiuj metis finan punkton al sia vivoj estis la unuaj posedantoj de la kampara domo, kiu aperis pendumigitaj sur arbo kun terura aspekto. Ekde tiam oni rakontas ĉia-specajn okazintaĵojn, ekzemple la ofta ĉeesto de olda monaĥo kiu avertis pri teruraĵoj baldaŭ okazuntaj kaj pri konstanta aŭskultado de veoj kaj infanaj ploroj, kvankam neniu loĝis jam tie.

Kompreneble, ĉi ĉio povas esti kaŭzita de ĝenerala timo, tamen ĉiuj asertis, ke sur la loko estis oftaj la nebuloj kaj la birdoj tute malaperis el tiu zono. Kiel persona sperto mi devas diri, ke antaŭ kelkaj jaroj mi vizitis la vilaĝon Priego de Córdoba pro laboraj kialoj.

Mi ofte profitas tiajn vojaĝojn por aĉeti, kaj porti hejmen, naturajn produktojn. Tion mi faris ankaŭ tiam. Mi vidis kamparan domon apud la aŭto-vojo kie oni anoncis la vendadon de naturaj formaĝoj. Mi haltis la aŭtomobilon kun la celo aĉeti kelkajn el tiuj.

Ĉe la kamapara domo, kiu utilis ankaŭ kiel vendejo, juna knabino vendis al mi grandan fromaĝon. Post la pago mi demandis al ŝi:

- Ĉu troviĝas tre fore de ĉi tie la kampara domo de *Los Asombros?*

Mi devas diri, ke la vizaĝo de la knabino paliĝis, ŝi nervoziĝis kaj iom balbute ŝi demandis al mi:

- Kion vi serĉas tie?

Verdire, mi ne sciis kion respondi. Mi malbone memoras, ke mi parolis pri ebla vizito de la loko, ĉar, laŭdire, tie okazis strangaĵoj. Ŝia respondo ankaŭ estis tre rapida:

- Tiu loko ne estas malproksime de ĉi tie, tamen pli bone se vi ne iras tien. Ne temas pri vizitinda loko kaj krome pensu, ke vi, post la vizito, poste devos uzi la aŭtomobilon, do mi ne rekomendas al vi fari tion.

Kompreneble, mi diris eĉ ne unu vorton plian.

J.M.R.H.



Vorta Piramido





1 □

2 □ □

3 □ □ □

4 □ □ □ □

5 □ □ □ □ □

6 □ □ □ □ □ □

7 □ □ □ □ □ □ □

8 □ □ □ □ □ □ □ □

Nia amiko, la Faraono Keopso, sendis al ni jenan vort-ludon. Komencu per la plej alta kvadrato, tiu signita per la cifero 1. Por solvi la kvadraton 2-an uzu la literon de la kvadrato 1-a plus alia litero. Tiu de la kvadrato 3-a egalas al la literoj de la 2-a plus alia, kaj tiel plu. Ne timu, ĝi estas ege facila !

1.- Finaĵo de la infinitivoj.
2.- Vi kaj mi.
3.- Persona nedefinita pronomo signifanta: “la homoj”.
4.- Ĉeso de ago.
5.- Helena duondiino.
6.- Sen la lasta vokalo, alkaloido ekstraktata de la opio.
7.- Enhavo de la komunikitaĵoj.
8.- Greka kord-instrumento

Solvo al la pasintnumera krucvortenigmo.

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1	m	e	m	u	a	r	o	n
2	o	r	a	r	■	u	n	u
3	g	o	r	ĝ	o	n	■	m
4	o	t	■	o	k	a	z	e
5	l	i	a	n	o	■	e	r
6	o	k	e	■	k	i	n	o
7	j	a	r	d	o	n	■	j
8	n	j	o	r	u	t	■	n


Ĉu la revuo plaĉas al Vi? Ĉu Vi ŝanĝus ion?
Ĉu io aldonebla? Ĉu forviŝi ion?
Komentu kaj proponu per jena kontaktilo:

esperanto14@ono.com



HUMURO





La numero 106-a de nia revuo aperos dum la monato julio 2018. Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla se ni ĉiuj kunlaboras. DANKON !

esperanto14@ono.com

GAZETO ANDALUZIA
Apartado de Correos 3142
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

★

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
Antonio Rodríguez Gasch

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

TTT-paĝo: www.esperanto.ac
Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

Estimata leganto:

Post unu jaro da ĉeso en la eldonado de la andaluzia esperantista revuo ni denove ekmarŝas. Pro tio, ne temas pri eraro tio kio aperas sur-kovrile en ĉi tiu numero, kiu tutcerte rilatas al la monato junio 2017-a. Ni celas eldoni 4 numerojn en la jaro, tial ni daŭrigos la serion, kiu haltiĝis en la pasintjara monato marto.

Dum la venontaj monatoj ni daŭre eldonos sinsekvajn numerojn de *Gazeto Andaluzia*¸ tiel ni normaligos la eldonadon, tion ni esperas atingi en la proksima monato septembro.

Ni dankas vian komprenemon kaj ĉiujn mesaĝojn ricevitajn, en ili oni demandis al ni kial ne aperis la andaluzian revuon en la internacia lingvo.

Jen ni denove, ni esperas ĉiam ricevi vian kunlaboradon.

Ricevu korajn salutojn.

La teamo de *GAZETO ANDALUZIA.*

Estimado Lector:

Después de un año de interrupción en la edición de la revista esperantista andaluza volvemos a ponernos manos a la obra. Por eso no es un error lo que se indica en la portada de este número, que realmente corresponde al mes de junio de 2017. Nuestro objetivo es editar 4 números al año, por lo que proseguimos la serie que dejamos interrumpida en marzo del año pasado.

En los próximos meses se irán editando números sucesivas de *Gazeto Andaluzia*, hasta conseguir normalizar su edición, lo que esperamos que ocurra en el próximo mes de septiembre.

Agradecemos su comprensión y todos los mensajes que nos han ido llegando a la redacción durante estos meses, preguntando por qué no aparecía la revista andaluza en la lengua internacional.

Aquí estamos de nuevo y esperamos contar siempre con su colaboración.

Reciba un cordial saludo .

La redacción de GAZETO ANDALUZIA.

103a UNIVERSALA

KONGRESO

de ESPERANTO

LISBONO 2018

28 JULIO – 4 AÛGUSTO